'1053 La traduko imitas la popolajn nomojn; la botanikaj latinaj estas: Vulpino – cantharellus cibarius; arbarano – boletus edulis; ruĝulo – lactaria deliciosa (agaricus deliciosus); muŝomorto – agaricus (amanita) muscarius; rusuleto – russula; kaprido – boletus luteus; funeleteo – cantharellus aurantiacus; blankulo – lactaria piperata; polvulo – lycoperdon.

'1055 Unu el litvaj popolkantoj parolas pri fungoj militirantaj sub komando de „arbarano”.

'1085 Karneola – flavoruĝa.

'1091 Otiso, birdo granda kiel meleagro, malfacile alirebla.

'1092 Ĥaradrio, birdo vadanta, nestas en vastaj marĉoj.

'1111 Moknomo por bienposedanto, vilaĝa mastrumanto.

'1121 Piotrków, urbo en Pola Reĝlando, estis en malnovaj tempoj loko de kunvenoj kaj kronlandaj sejmoj; poste sidejo de la plej supera aŭ Kronlanda tribunalo. – Dubno, urbo en Volinio, antaŭe fama per foiroj kaj kontraktoj (negocaj interkonsentoj).

'1190 Tibur, urbo proksima al Romo, hodiaŭa Tivoli; tie loĝis la glora roma poeto Horaco.

'1191 Pausilippo, monto fama per grandega groto, proksime al Neapolo.

'1198 Menadoj, virinoj el sekvantaro de greka dio Bakĥo, portis en manoj bastonojn ĉirkaŭvolvitajn per hedero kaj vinberaj branĉetoj.

'1230 Breughel, Brueghel Jan (1568-1625), fama nederlanda pentristo de pejzaĝoj. Lia frato de helsche Brueghel pentris scenojn inferajn.

'1231 Ruisdael Jakob, fama holanda pejzaĝisto.

'1232 Orłowski Aleksander (1777 en Varsovio – 1832 en Petersburgo), fama pentristo kaj desegnisto.

'1257 Miozoto.

'1270 Armillaria; pri ceteraj fungoj komparu al rimarko 1053-a.

'1290 Pranestejo (matecznik), nealirebla loko en arbarego, kie la sovaĝaj bestoj naskiĝas kaj vivas sendanĝere.

'1294 Centulo aŭ centestro, estro super cent kabanjoj.

'1295 Deviga komunuma laboro ĉe vojoj kaj pontoj; servuto, laboro por bienposedanto.

'1297 Speco de anglaj hundoj, malgrandaj sed fortikaj, servantaj en pelĉaso je granda sovaĝa besto, precipe urso (buldogoj).

; Spravnik, landa poliestro, kaj Strapĉi, speco de registara prokuroro; rusaj oficistoj, kiuj pro misuzado de sia povo estis malamataj de civitanoj; Strapĉina, la nomo de la hundino

'1303 Oferto, mallongigo de offertorium, dua parto de la meso kun preĝoj por la intencita celo

,& Libro kvara – Diplomatio kaj Ĉaso:

97) Bjalovjeĵa
praarbarego en la Grodna
gubernio kun la vilaĝo
Białowieża. – Świtez,
pentinda lago en la
Novogrodeka distrikto, fama
pro la balado de Mickiewicz
Svitezja nimfo (Świtezianka).
– Ponary, montoj. –
Kuszelewo, vilaĝo
malproksime de Novogrodek

98) Mendog aŭ
Mindove, litva reganto en la
13-a jarcento; li celis al
unuiĝo de ĉiuj litvaj landoj
sub unu reĝa sceptro. –
Vitenes, litva duko, mortinta
komence de la 14-a jarcento; li
batalis dum la tuta vivo,
precipe kontraŭ la germanaj
Krucokavaliroj (krucistoj), por
konservi sian landon en tuteco
kaj sendependeco. – Gedimin,
Granda Duko litva (1315–
1341), patro de Kiejstut kaj
Olgierd kaj avo de Vitold kaj
Vladislavo Jagiełło, kiu
alpreninte la bapton kaj
edziĝinte kun Jadviga, nepino
de la pola reĝo Kazimiro la
Granda, lasta vira posteulo de
la Piasta dinastio, donis
komencon al la Jagiellona
dinastio, reganta en Polujo de
1386 ĝis 1572. Litvo doninte

al la Pola Krono sian dinastion
kaj akceptinte kun la roma,
katolika kristaneco la polan
kulturon, post la libervola
unuiĝo de ambaŭ ŝtatoj, nacie
tute kunkreskis kun Polujo kaj
dum perfortaj dispartigoj de la
komuna pola ŝtato kaj poste,
Litvo refoje heroe kunbatalis
por la restarigo de ĝia tuteco
kaj sendependeco. Multaj el la
plej eminentaj polaj viroj estis
litvaj poloj.

99) Laŭ tradicio
Gedimin havis sur la Ponara
monto sonĝon pri fera lupo kaj
laŭ konsilo de Lizdejko
(ĉefpastro de la idolana
Litvujo) li fondis la urbon
Vilno, ĉe la enfluo de la rivero
Vilejka en Viljon

100) La unuaj fondintoj
de Romo: Romulo kaj Remo

101) Zigmunto Aŭgusto,
lasta pola reĝo el la Jagellona
dinastio; li regadis de 1548 ĝis
1572 kaj estis levita laŭ
antikva kutimo sur la tronon
de la Granda Litva Duklando;
li ligis al zono glavon kaj
kronis sin per kolpako (alta
pinta ĉapo velura kun

zibelpelta borderaĵo). Li estis fervora ĉasisto.

102) En la Rosień-distrikta vilaĝo Bordzie, bieno de la litva „Landskribisto” Paszkiewicz, kreskis kverko konata laŭ la nomo Baublis, kiu en idolanaj tempoj estis pie adorata kiel sanktaĵo. En la interno de tiu elputrinta grandegulo (forhakita en 1812), ŝtatviro Paszkiewicz aranĝis muzeon de litvaj antikvaĵoj.

103) Proksime al la Novogrodeka paroĥejo kreskis antikvaj tilioj; multaj el ili estis forhakitaj ĉirkaŭ 1812.

104) Czarnolesie, vilaĝo, en kiu loĝis Jan Kochanowski (1530-1584), plej eminenta poeto pola en la 16-a jarcento. Sub branĉegoj de tilio, kiu ĉirkaŭombris lian domon, li ofte meditis kaj verkis multajn siajn belegajn poemojn, interalie la famajn korskuantajn elegiojn: *Treny* post la morto de sia plej amata filineto Urszula.

105) Koncernas la ukrainan polan poeton Seweryn Goszczyński (1801–1876), kaj precipe lian poezian rakonton *Kanjova Kastelo* (*Zamek Kaniowski*), kiu laŭ la enhavo kaj karaktero estas vera kozaka kanto, plena de malserena, grandioza spirito de la stepoj.

106) *Driado*, antikva greka nimfo loĝanta en arbo.

107) *Tiro*, urbo en antikva Fenicio.

108) *Hiramo*, reĝo de Tiro, ŝatanto de grandiozaj konstruaĵoj, estis en rilatoj kun Salomono, kiu konstruis la faman templon.

109) Temas pri turo en la itala urbo Pisa. La turo estas 54 metrojn alta kaj 5 metrojn klinita.

110) *Cices*, fadenoj; ĉi tie oni parolas pri tefilim, leda skatoletoj kun la diaj Dek ordonoj.

111) Kolomijkoj (kołomyjki), rutenaj kantoj, kiel la polaj mazuroj aŭ mazurkoj (t.e. mazuretoj).

112) Aŭzonoj, antikva loĝantaro de la sudokcidenta parto de Italujo; ĉi tie en senco de Italujo. La kanto estas marŝo de Dąbrowski, kies komenco troveblas en la rimarko 9.

113) Loko honora, originale pokucie: loko, kien antaŭe oni starigis la domajn diojn kaj kie ĝis nun la rusoj pendigas la bildojn de sanktuloj. Tie litva kampulo sidigas sian gaston volante lin honori.

114) El la latina: plej respektinda.

115) Kovno, urbo komerca en Litvo, ĉe la riveroj Vilja kaj Njemen. Ĉi tie, en 1819, la 21-jara Mickiewicz estis instruisto gimnazia.

116) Częstochowa apartenis tiam (1811) al Varsovia Duklando (komparu

la rimarkon 43). Pro la rusa-franca milito la litvanoj esperis, ke Napoleon kiel venkanto reunuigos Litvon kun Polujo kaj restarigos la polan regnon en la antaŭaj limoj.

117) La rusa eklezio; tio signifas: Litvo estas sub rusa regado.

118) Registara gazeto eldonata tiam en Vilno.

119) Mitro, princa krono super princa blazono.

120) Por dokumenti sian sindonecon al la nova religio, la konvertitoj kutimis meti krucon en la familian blazonon.

121) Poraj – la blazono de Mickiewicz – havis blankan rozon sur ruĝa ŝildo.

122) Strykowski Maciej, pola historiisto, vivinta en la 16-a jarcento.

123) Gdańsk, urbo apud Vistulo, ĉe la Balta maro, ekokupita de prusoj post la dua dispartigo de Polujo (1793). En 1807 la urbo kapitulaciis al la franca marŝalo Lefebvre.

124) Sukmano, vilaĝana drapsurtuto; ĉamaro aŭ ĉamarko, pola laĉvesto; taratato aŭ taratatko, mallonga pola kapoto kun laĉoj kaj franĝoj.

125) En la batalo ĉe Auŝtritz (1805), en kiu Napoleon venkis la aliancan armeon aŭstro-rusan sub komando de Kutuzov, ĉeestis persone la imperiestroj Franco la II-a kaj Aleksandro la I-a kun sia frato Grand-Duko Konstanto.

126) Kvesti, kolekti almozon por bonfara celo; ĉi tie por monaĥejo.

127) Standardestro (chorąży), antaŭe en Polujo ofico krona, kortega, aŭ landa. Dum grandaj solenaĵoj, militoj k.t.p. la standardestroj portis

standardon ŝtatan aŭ landan. Poste ĉi tiu ofico fariĝis titola.

128) Gulo, speco de urso.

129) Laŭ popola opinio, la bekoj de grandaj rabobirdoj en maljuneco ĉiam pli kurbiĝas kaj fine la supra pinto fleksiĝinte fermas la bekon kaj la birdo mortas de malsato.

130) Efektive oni neniam trovas skeleton de mortinta besto.

131) Birdeto, malgrandkalibra pafilo, en kiun oni metas malgrandan kuglon. Bonaj ĉasistoj el tiaj pafiloj trafas flugantan birdon.

132) Kutime Miĉjo (Misjo) nomo donata ŝerce al urso.

133) Serpentino, sabro kurbigita.

134) Vidu la rimarkon 123.

135) En boteloj de Gdanska brando (likvoro) estas funde oraj folietoj.

136) Kirejko, turka surtuto kun pelta subaĵo.

137) Vojski aludas ĉi tie la epopeon Eneido de la fama roma poeto Publius Vergilius Maro.

138) Aŭdiloj – oreloj de leporo; saltiloj – piedoj de leporo, laŭ pola lingvo ĉasista.

139) Vergilio, vidu la rimarkon 137.

140) Dido, filino de la reĝo de Tiro, devigite forlasi la patrujon, venis sur la bordon de Afriko, kie ŝi elpetis ĉe la reĝo tiom da tero por fondo de loksidejo, kiom kovros bova felo. La reĝo konsentis; tiam Dido tranĉigis la felon en maldikajn strietojn kaj ĉirkaŭzonis per ili grandan spacon, sur kiu ŝi konstruis la

urbon Kartago. – Vojski eraris parolante, ke li legis tion en verkoj de Vergilio, ĉar ĉi tiu priskribo, kvankam Vergilio multe parolas pri Didono, ne troviĝas en lia Eneido. La maljunulo verŝajne sciiĝis pri tio el iaj klarigoj al Eneido.

141) Skuiĝanta veturileto.

Libro kvina – Kverelo

142) Vidu la rimarkon 16.

143) Enkondukis, enportis (leĝe).

144) Originale: Kiel Filip el Konopie t.e. malĝustatempe (proverbe). Laŭ tradicia klarigo de la proverbo iam la parlamenta delegito „Filip el Konopie” komencis dum kunsido paroladon, kiu tute ne koncernis la objekton de la debato. La delegitaro laŭte ekridis kaj la malĝustatempa ekparolo fariĝis proverba. Ĉar leporon oni nomas ankaŭ en kelkaj distriktoj „Filipo”, kaj

„Konopie" signifas „kanabo”, do la proverbo povas esti simple klarigata kaj ĉi tiun pli simplan klarigon sekvas la traduko.

145) Lida kaj Oszmiana, urboj en Litvo.

146) Originale: „mutigi” estas „germanigi” (mutuligi), vortludo malfacile imitebla, ĉar en slavaj lingvoj, laŭ „muta” – niemy, la nomo de germano (Niemiec) signifas popol-etimologie „mutulo”; kvankam aliparte ekzistis iam apud Rejno la germana gento de „nemetoj”.

147) Citaĵo evangelia, proverbe kiel esprimo de mirego.

148) Naliboki, urbeto en Litvo, en la distrikto Oszmiana.

149) Duko Karlo de Nassau-Siegen (1745-1808), fama militisto kaj aventuristo. Li estis rusa admiralo kaj venkis turkojn ĉe Lemano; poste li estis venkita de

svedoj. Kelkan tempon li restadis en Polujo kaj havis polan civitanecon.

150) El la latina: spolia opima – venkosignoj, akiraĵoj.

151) Ŝlosisto (klucznik) kaj noktuo (puszczyk) donas en la lingvo pola riman asonancon, formante tiel vortludon malfacile imiteblan. Por tio la Ŝlosisto en sia respondo vortludas kun noktu' kaj nokte en la verso 622.

152) El la latina: vulgo – ordinare, kutime.

153) Obdukcio, ago de juĝa oficisto, de li protokole farita.

154) Vizio, ofica vokista rigardado de la loko kaj de la faritaj tie malutiloj.

155) Brzechacz, bojanto, kalumnianto, vortlude kun la samradika nomo de la Vokisto Brzechalski

156) El la latina: mores – moroj; deca konduto, respekto. La senco de la frazo estas: „Mi vin punos”.

157) Speco de sabro, tranĉa kaj pika armilo, iom kurbigita.

158) Duonĉano, parto de ĉano, subtenanta en fajroŝtonaj pafiloj la ŝtonon.

159) Avoj (Dziady), festo de mortintoj, litva popola festo, konservita el idolanaj tempoj kelkloke ĝis hodiaŭ, por honori la animojn de mortintaj parencoj. La sorĉisto (guślarz) invokis la spiritojn kaj oni ilin regalis per manĝo kaj trinkaĵo. – Tiu ĉi festo formas la centron de Dziady, unu el la plej sublimaj poeziaj verkoj de Mickiewicz. Fragmento el tio, Improvizacio de Konrad, ekzistas en Esperanto.

'744 La Ŝlosisto ne komprenas la stilon de la Grafo. Same kiel tiu li konfuzas ĵokeojn kun lakeoj, li ne konas la vorton „vasaloj” (wasale) kaj anstataŭigas ĝin per „vonsaloj” (własale), kiuj

signifas lipharulojn kaj estas sinonimo de nobeloj flegantaj grandajn lipharojn.

161) Zaścianek aŭ Okolica oni nomas en Litvo nobeletaran kolonion por diferencigo de kampulara vilaĝo. La fierajn nobeletojn-lipharulojn ni vidis jam en la drinkejo de Jankjel en la Libro Kvara. La ŝerce-fantaziaj nomoj de la nobeletoj Rzezikowo, Ciętycze, Rąbanki aludas la batalemecon de iliaj loĝantoj (ĉar rzezik – tranĉeto, tranĉilo; cięty – tranĉita, akra, tranĉema; rąbanka – eta hakado, sabrado: nur Dobrzyn devenas de dobry – bona).

162) Vidu la rimarkon 124.

163) Konfederatka, kvarangula ĉapo kun borderaĵo el ŝafida pelto.

Libro sesa – Nobeletejo

164) Nomaro de la juĝataj aferoj.

165) Depreki – peti pardonon.

166) Targovico, t.e. la ĉefoj de la Targovica Konfederacio, formita kontraŭ la Maja Konstitucio (komparu la rimarkon 54). La Targovicianoj opiniis, ke Jacek Soplica, la mortiginto de la Tablestro, estis ilia partiano kaj rekompence por lia faraĵo ili donis al Soplicoj parton de bienoj, restintaj post la mortigito, kiu apartenis al la Maja Konstitucio. Tiu ĉi favoro de la Targovicianoj estis kvazaŭ makulo sur la Soplica familio. La klarigo sekvas ne pli frue ol en la Libro Dekaj.

167) En la jezuitaj mezaj lernejoj (kolegioj) la klasoj estis nomataj laŭ ĉefa instruata latina objekto: gramatiko, sintakso, poezio, retoriko (elokventeco).

168) Kisjel (acidaĵo) estas litva manĝaĵo, speco de gelato preparata el avena pasto, kiun oni lavas per akvo, ĝis kiam ĉiuj farunpartetoj estas forigitaj. El tio devenas

la supra proverbo pri malproksima parenceco. Ĉi tie ĝi signifas: La Grafo estas tre malproksima parenco de Horeŝkoj; li havas en si malmulte da Horeŝka sango.

169) Princo Józef Poniatowski, naskiĝinta en 1763, estis nevo de la reĝo Stanislavo Aŭgusto, generalo de la pola armeo, post la enmarŝo de Napoleono la I-a en Polujon ĉefestro de nacia gvardio kaj organizanto de nova armeo pola; li pereis heroe ĉe Leipzig en la rivero Elster (1813).

170) Krono estis nomata Polujo por diferencigo de Litvo.

171) En 1807 Napoleono la I-a faris kun Prusujo kaj Rusujo en Tilsit (Tylża) apud Memel (Njemen en Prusujo) pacon, ĉe kiu estis fondita la Varsovia Duklando; Litvo restis ĉe Rusujo

172) Postkuro (Pogoń), blazono de Litvo: kavaliro sur ĉevalo en plena kuro.

173) Samogitujo (Žmudź): parto de Litvo, apud la Balta maro, havas urson en la blazono.

174) Vilno; vidu la rimarkon 99.

175) Królewiec, germane Königsberg.

176) Barono Louis Bignon, diplomato, publicisto kaj historiisto franca; li estis ĉe flanko de Napoleono la I-a kaj loĝis en Varsovio (1811–1813). Pri princo Józef vidu la rimarkon 169.

177) Kałamaszka, veturileto kun tili-ŝela plektaĵo. Dum la litero „l” havas en la pola lingvo, kiel en Esperanto molan sonon, „ł” sonas kiel „l” kataluna, aŭ bulgara. La transskribo anstataŭas „ł” per la simpla „l”, kvankam oni povus ankaŭ skribi „ŭ” (ekz. kaŭamaŝko), ĉar multaj poloj la strekitan „ł” tiel nekorekte elparolas.

178) Tradi – ofice forpreni havaĵon de ŝuldanto kaj doni ĝin al kreditoro en posedon.

179) Wołodkowicz, aventuristo, post multaj malpacaj skandaloj estis kaptita en la urbo Mińsk kaj mortpafita laŭ tribunala verdikto.

180) Johano la III-a Sobieski, reĝo de Polujo, liberiginto de Vieno kontraŭ turkoj, regadis de 1647 ĝis 1696.

181) Originale: Ĝeneralan moviĝon per vergoj (branĉetaĵo, wici). Por kunvoki ĝeneralan enarmeigon la reĝo ordonis en ĉiu paroĥejo starigi altan stangon, ĉe kies pinto estis fiksita balailo aŭ branĉetaĵo. Tio estis nomata: „disdoni branĉetaĵon”. Ĉiu plenkreskinta nobelo havis la devon aperi senprokraste, por ne perdi sian nobelecon, ĉe la vojevoda standardo

182) Pola; komparu la rimarkon 34.

183) Tero Dobĵina, distrikto (hodiaŭ Lipna) en Mazovio, prapola lando kun la centro Varsovio. La mazovianoj estas nomataj mazuroj. La Dobĵinanoj, enmigrintaj el Mazovio en Litvon, donis la nomon Dobĵin (Dobrzyn) al sia nobeletara kolonio; la nomo Dobrzyński signifas Dobĵina.

184) Sanktulo adorata en la Kronlando (t.e. en Polujo).

185) Povas formi en la lingvo polan vortludon, ĉar la pola nomo de kuniklo (latine cuniculus) królik signifas ĝuste „reĝeto”, laŭ germana antikva künigel (Königlein).

186) Sabroj el la tempo de Zigmuntoj, reĝoj de Polujo.

187) Armaturo, armaĵo kaj partoj al ĝi apartenantaj ĉirkaŭ la blazono.

188) Mars, antikva dio de milito; Venus, diino de beleco kaj amo; al ŝi estis dediĉitaj la ame kverantaj kolomboj.

189) Bunĉuko, ĉevalvosto, pendigita sur lancotenilon, estis uzata en la turka armeo kiel hetmana (armeestra) insigno. La ĉi tie menciita devenis el la Viena ekspedicio de Sobieski kontraŭ turkoj en 1683.

190) Antikvaj romaj diaĵoj: Ceres, diino de grenoj kaj bonrikoltoj; Pomona, zorgantino de fruktarboj kaj ĝardenaj arbustoj; Flora, diino de printempo kaj floroj; Vertumnus, dio de fruktoj.

191) Ano de la Bara konfederacio, t.e. de la armita ligo, kiun la pola nobelaro formis en la Podola urbo Bar en 1768 kontraŭ la malforta, ŝanceliĝema reĝo Stanisław Poniatowski kaj liaj rusaj aliancanoj, kiuj lastaj permesis al si indignigantajn perfortaĵojn en Polujo.

192) Damaska karabelo, fama speco de sabroj el vejnstria ŝtalo, faritaj en la malgrandazia urbo Damasko.

193) Antoni Tyzenhaus, litva trezoristo, t.e. financa ministro de la Litva Grand-Duklando, fama disvastiganto de industrio kaj fondinto de kelkaj instruaj institutoj en Litvo, mortis en Varsovio (1785).

194) Grafo Aleksander Pocij subtenis malavare polajn elmigrintojn kaj la legiojn. Dobrzyński defendis lin, kiam Suvorov konkeradis Pragon (vidu la rimarkojn 8 kaj 27).

195) Vidu la rimarkon 60 pri „vicinoj”.

196) Pia kanto matena, populara en tuta Polujo. Jen la unua strofo (laŭ Karpiński): „Ĉe matena sunradio: – Vi laŭdatu, granda Dio! Ĥore kantas elementoj, – Oceanoj, kontinentoj.

Kaj de homo, por favora – Donacaro ĉiuhora.

Al Kreinto kaj Savanto, – Ĉu ne sonus laŭda kanto?”

197) Legu la rimarkon 36.

198) Bryczka, vojaĝveturilo; pri kałamaszka vidu la rimarkon 177.

Libro sepa – Interkonsilo

199) La rivero, ĉe kiu estas situata la urbo Poznań de la samenomata grandpola duklando.

200) Vidu la rimarkon 123.

201) Grafo Józef Grabowski, posedanto de la bienoj Łuków en la grandpola Poznana Duklando; dum la Napoleonaj militoj li estis kolonelo de la generala stabo, poste li ludis grandan rolon en la publika vivo de la Duklando. En Łuków,

proksime al la urbo
Obiezierze, gastis Adam
Mickiewicz kun sia frato
Franciszek.

202) Jenio, urbo apud la
rivero Saale, memorinda pro
la decida batalo, en kiu (1806)
Napoleon la I-a venkis
prusojn.

203) Titoloj de germanaj
oficistoj.

204) El la germana: Ho
sinjoro Dio, ho ve!

205) Herr – sinjoro;
Haarzopf – harplektaĵo,
portata tiam de oficiroj.

206) Pregel, Pregola,
rivero, ĉe kiu situas
Królewiec.

207) Armita unuigo de
nobelaro sub estr-bastono, t.e.
sub prezido de marŝalo
elektita.

208) Mallonga, laŭ
modo internacia.

209) Antaŭaj parolintoj;
la fremda vorto lasita ĉi tie
intence laŭ originalo.

210) Famaj estis
siatempe la kontraktoj aŭ
kunvenoj en Kijovo kaj
Minsk; en certaj templimoj ili
okazis por farado de diversaj
ĉiuspecaj interkonsentiĝoj,
precipe pri komerca foiro.

211) Babina Respubliko.
En 1568 fondis pola nobelo,
nome Pŝonka, en sia bieno
Babin ĉe Lublin, satiran
societon, kiu ricevis la nomon
de Babina Respubliko. Ĝi
vapis la morojn de
samtempoj kaj sendis al ĉiu,
kiu distingiĝis per difekto aŭ
malsaĝeco, diplomon, per kiu
li estis akceptita en la
respublikon kaj ricevis en ĝi
oficon: „Kuracfuŝulo” fariĝis
kuracisto, „timulaĉo” –
armeestro, „disipulo” –
ekonomio.

212) Trakto, landvojo,
kuniganta grandajn urbojn
(ŝoseo).

213) Vortoj sonimitaj,
signifantaj sensencan bruon.

214) Vortoj sone
imitantaj la skermadon.

215) Skribistoj (pisarze),
oficistoj en malnova Polujo,
apartaj por la Krono kaj Litvo;
ili laboris flanke de reĝoj kaj
kancelieroj kaj kun ilia scio
eldonis aktojn kaj diplomojn.

216) Plej malalta (unua
komenca) klaso en lernejo.

217) Vidu la rimarkon
69.

218) Malsupra ĉapeto,
ne deprenata de la kapo

219) Jegroj, ĉasistoj; la
germana vorto, uzata en la
rusa armeo.

220) Bielica, urbeto
apud Njemen.

221) Łosośna, alfluo de
Njemen.

222) Infanoj, pola etiga
formo laŭ la hebrea baĥur
(junuloj); fein – bele (el la
germana).

223) Vidu la rimarkon
60.

224) Marŝaleco,
administrado de la domo kaj
servistaro.

225) Piara konvikto,
edukejo kaj instruejo,
administrata de pastroj Piaroj,
estis tiutempe plej bona
instituto de publika edukado
en Polujo. – „Vikto” –
vivteno, nutraĵo.

226) Promovi – antaŭen
ŝovi, levi sur pli altan
pozicion.

227) Plej delikata kaj
plej bona faruno en la tuta
lando devenis el mueliloj en
Marymont apud Varsovio.

228) Sak, bovida ledο,
sinonimo de stultulo.

229) Ekzekvi – plenumi
juĝe

230) Plusk, plask –
vortoj sone imitantaj
plaŭdadon, laŭ originalo.

231) Ŝarĝa veturigilo.

232) Zan kaj Czeczot
estis universitataj kolegoj kaj
amikoj de la poeto, do li metas
ĉi tie iliajn nomojn apud la sia.

Libro oka – Invado

233) Harmoniko, ĉi tie
muzika instrumento,
konsistanta el vitraj diskaj kaj
rulo (aŭ sfero), kiu turniĝante
kaj tuŝante disketojn eldonas
sonojn.

234) Harpo de Eolo,
korda instrumento muzika,
kiun tonigas ekblovoj de
vento.

235) La steloj hodiaŭ
nomataj „Ĝemeloj”
(Dunaskitoj).

236) Kribrilo,
konstelacio nomata
„Harplektaĵo de Bereniko”.

237) Davida veturilo,
konstelacio nomata de
astronomo „Granda Urso”.

238) Satano, ĉefdiablo.

239) Estis la kutimo
pendigi en preĝejoj la
elfositajn skeletojn, kiuj laŭ
opinio de la popolo estis ostoj
de grandeguloj. – Mir, urbo en
Litvo.

240) Memorinda kometo
el 1811.

241) Puzyna Elżbieta,
fama fondintino kaj
subtenantino de la astronomia
observatorio en Vilno, mortis
en 1767.

242) Pastro Poczobut
Odolanicki (1728-1810), fama
astronomo pola, eldonis la
verkon Pri zodiako en
Dendera kaj kunhelpis per siaj
astronomiaj observoj al

Lalande ĉe liaj kalkuloj pri rondo de la luno. Poczobut estis profesoro kaj rektoro de la Vilna Akademio (1764-1799). Lasinte sian instruistan okupon li revenis al la societo de Jezuitoj en 1808.

243) Jan Śniadecki (1756-1830), eminenta matematikisto kaj astronomo pola, profesoro de la Krakova, kaj post Poczobut rektoro kaj profesoro de la Vilna akademioj.

244) Karoso, kovrita kaleŝego.

245) Branicki Franciszek Ksawery, granda hetmano kronlanda, kaj poste generalo rusa; li estis apud Feliks Potocki kaj Seweryn Rzewuski unu el la formintoj de la Targovica konfederacio (komparu la rimarkon 54).

246) Jassy, urbo en Rumanujo; en 1792 kunveturis tien la Targovicianoj.

247) Leŭtenanto de kirasa signo, rango oficira ĉe t.n. kirasaj standardoj en la pola armeo.

248) Turkaj armeoj, marŝantaj kontraŭ Vieno.

249) Pastro Bartochowski, jezuito, dediĉis sian laŭdan poemon sub la titolo Fulmen Orientis al reĝo Johano la III-a, post lia reveno el la Viena ekspedicio.

250) T.e. princo Adam Kazimierz Czartoryski, ĉefestro de podolaj landoj, civitano meritplena por patrujo. Li naskiĝis en Gdańsk (1734) kaj mortis en Sieniawa (1823).

251) La duelo de la duko de Nassau (komparu la rimarkon 149) kun tigro en Libio resonadis tiam en ĉiuj gazetoj eŭropaj.

252) Ĉefo de samregulaj monaĥejoj en monaĥeja provinco

253) El la latina: En danĝero de morto.

254) Meduzo – ĉe antikvaj grekoj – fabela, monstra virino kun serpentaj haroj kaj rigardo ĉion ŝtoniganta.

255) Ŝwitezianka – laŭ popola famo, sur la bordoj de la lago Ŝwitez (vidu la rimarkon 97) montriĝas nimfoj, kiujn la popolo nomas Svitezjankoj t.e. Svitezjaninoj.

256) Sinjorinoj, fraŭlinoj (france kaj internacie), laŭ originalo.

257) Leĝa enkonduko.

258) Tiuj vortoj estis diritaj de la Ŝlosisto per ŝerce imitita malbona latinaĵo, laŭ uzata tiam en juĝejoj, kiu enhavis ofte polajn esprimojn kun latinaj deklinaciaj finaĵoj. La frazo signifas: „kun boskoj, arbaroj kaj limoj, kampuloj, vilaĝestroj kaj ĉiuj aĵoj, kaj kelkaj aliaj”.

259) Manlius, brava militisto, post invado kaj dezertigo de Romo per Galloj en 389 a. K. savis antaŭ ili Kapitolon (Roman kastelon kun templo de Zeŭso) vekite per krio de sanktaj anseroj

260) Speco de koboldo aŭ malbona spirito.

Libro naŭa – Batalo

261) Kunvoko de armeo.

262) Flava Libro, tiel nomata laŭ kovrilo, estis barbara libro de rusaj militaj leĝoj. Ofte dum paca tempo la registaro anoncis tutajn provincojn kiel estantajn en milita stato kaj laŭ la Flava Libro donis al armea komandanto plenan povon pri la havaĵo kaj vivo de loĝantoj. Tiel ekde 1812 ĝis la revolucio (1831) tuta Litvo dependis de la Flava Libro, kies plenumanto estis la Grand-Duko tronsekvanto.

263) Antaŭuloj, prapatroj.

264) Pastro Józef Baka, jezuito, vivanta en la 18-a jarcento, verkis la poemon Rimarkoj pri morto neevitebla, al ĉiuj komuna, el kiu Mickiewicz citas ĉi tie kelkajn versojn.

265) Brokato, orteksaĵo. – Skarlato, skarlatkolora teksaĵo, metafore en la senco de reĝa aŭ kardinala digno.

266) El la germana: Dekunu-dekdu (kartludo).

267) Sukinsyn (hundinfilo), insulta vorto rusa.

268) Tasako – larĝa glavo; sturmako – pafilo kun larĝa tubo ĉe elfluga aperto.

269) Kruca arto, sabrado dekstren kaj maldekstren, kvazaŭ krucforme.

270) Kaporalo, instruanta rekrutojn.

271) Praporŝĉik, la unua rango oficira en la rusa armeo tiutempe.

272) La litva maczuga estas farata laŭ sekvanta maniero: oni elektas junan kverkon kaj ektranĉas ĝin de supre ĝis malsupre per hakilo, por vundi supraĵe la arbon, distranĉante la mukŝelon. En tiujn entranĉaĵojn oni enmetas akrajn silikojn, kiuj post kelka tempo enkreskas en la arbon kaj formas malmolajn tuberojn. La „maĉugoj” prezentis dum idolanaj tempoj la ĉefan armilon de la litova piedira armeo. Oni uzas ilin ĝis nun kaj nomas nasieki (tuberbastonegoj).

273) Post la leviĝo de Jasiński, kiam la litvaj armeoj cedis en direkto de Varsovio, la rusoj proksimiĝis al la forlasita urbo Vilno. Generalo Dejov, fronte de la stabo, rajdis tra la Pinta Pordego en la urbon. La stratoj estis malplenaj, la loĝantaro enfermis sin en la domoj. Tiam iu urbano, rimarkante kanonon forlasitan en strata angulo, ŝargitan per kartoĉoj, turnis ĝin al la pordego kaj

elpafis. Ĉi tiu unu pafo savis tiam Vilnon. Generalo Dejev pereis, kun li kelkaj oficiroj; la restintoj, timante embuskon, forcedis de la urbo. La nomo de tiu urbano ne estas certe konata.

274) Indulgo, konservo de vivo soldata.

275) Ĉefserĝento.

276) Cnicus benedictus aŭ centaurea benedicta, kuraca kreskaĵo.

277) Malnova rusa nomo de poloj.

278) Estis ankoraŭ poste invadoj, kvankam ne tiom famaj, tamen sufiĉe laŭtaj kaj sangaj. Ĉirkaŭ 1817 sinjoro U... en la Novogrodeka Vojevodlando, venkis dum invado tutan novogrodekan garnizonon kaj malliberigis la ĉefojn.

Libro deka – Emigracio – Jacek

279) Niobe laŭ antikvaj tradicioj estis edzino de la Teba reĝo kaj patrino de sep filoj kaj sep filinoj. Kolerigite pro ŝia fiereco, dio Apolono kaj diino Diana mortigis ŝiajn infanojn. La malesperanta patrino pro granda doloro transformiĝis en ŝtonon sur la monto Sipilos.

280) Oczaków, urbo apud la dekstra bordo de Dnepro; ĝi estis konkerita de princo Potemkin en 1788. – Izmail, fortikaĵo, kiun prenis sturme Suvorov en 1790. – Novi, en Italujo, estas memorinda pro la venko de rusoj kaj aŭstroj super francoj en 1799. – Preussisch-Eylau, en Prusujo; tie batalis sange Napoleon la I-a kontraŭ prusoj kaj rusoj en 1807. – Generalo rusa Korsakov estis helpe sendita al Suvorov en Svisujon kaj kape-batita apud Zuriko en 1799.

281) Raclawice, vilaĝo ĉe la nordorienta flanko de Kraków; ĉi tie Kościuszko, fronte de malgranda armeo (ĉirkaŭ 5 000 kaj inter ili 500 kampuloj armitaj per falĉiloj),

venkis 7 000 rusojn, la 4-an de aprilo 1794.

282) Maciejowice, urbeto apud la rivero Okrzejka, memorinda pro la batalo (la 4-an de oktobro 1794), en kiu Kościuszko estis venkita de la rusaj armeoj sub komando de Fersen, kaj grave vundita kun multaj aliaj li fariĝis militkaptito. Ĉi tiu batalo decidis la sorton de la Kościuszka insurekcio.

283) Meĉaĵo (pole lont, germane Lunte).

284) El la latina: Li ripozu en paco.

285) El la latina: Por komuna bono.

286) Kaŝujo por relikvoj, t.e. restaĵoj de Sanktuloj aŭ de aĵoj de ili poseditaj.

287) Himenajos, ĉe antikvaj Grekoj dio de edzeco

288) Potocki Włodzimierz, filo de Feliks (Szczęsny), kreinto de la Targovica Konfederacio (vidu la rimarkon 54), volis forviŝi la patran makulon kaj aliĝis al la pola armeo de la Varsovia Duklando (1808), kie li honore distingiĝis kaj ricevis la rangon de kolonelo; li mortis en 1811 havante 22 jarojn.

289) Pri Radziwiłł vidu la rimarkon 73.

290) La lasta sankta komunio, donata al la mortantoj.

291) Jan Tenczyński, Belza vojevodo, estis edziĝonta kun Cecilio, filino de la sveda reĝo Gustavo la I-a, sed li mortis en malliberejo en Kopenhago (1562).

292) Plej alta sankta altara Sakramento.

293) Vidu la rimarkon 53.

294) Kastelanoj estis superaj kaj malsuperaj. La Tablestro eraris dirante, ke la Kastelano de Vitebsk havis en la senato malsuperan lignan seĝon; kontraŭe, li apartenis laŭ digno al la superaj kastelanoj.

295) Vidu en la Libro Kvara la versojn 650-659 kaj 775-803.

296) Tio okazis en 1792, kiam Rusujo deklaris militon al Polujo, kaj la rusaj armeoj enpaŝis en limojn de la pola lando.

297) Jenoj, vidu rimarkon 202.

298) Ŝajnas, ke la Tablestro estis mortigita ĉirkaŭ 1792 dum la unua milito. La dua milito estis en 1794. – Pri Targovico vidu la rimarkon 166.

299) Postponi – malpli respekti, malŝati.

300) Galicio, parto de Polujo aneksita de Aŭstrujo. – Pri Grandpolujo legu la rimarkon 69.

301) Spielberg, urbo proksime al Brno en Moravio, tiam malbonfama pro sia malliberejo por politikaj krimuloj.

302) El la latina: severa malliberejo.

303) Pri Postkuro legu la rimarkon 172.

304) Józef Poniatowski, vidu la rimarkon 169.

Libro dekunua – Jaro 1812

305) Historiisto rusa similmaniere priskribas la aŭguraĵojn kaj antaŭsentojn de la moskvolanda popolo antaŭ la milito en 1812.

306) La dekstran alon de la Napoleona armeo komandis la reĝo de Vestfalujo, frato de Napoleon la I-a, Hieronimo

(Jérôme) Bonaparte, sub kies komando estis princo Józef Poniatowski, ĉefo de la pola armeo, havanta ĉirkaŭ 70 000 virojn. – Grodno, urbo apud Njemen, ĉelime de Litvo, Polujo kaj Blank-Rutenujo. – Słonim, urbo en la Grodna gubernio.

307) Kniaziewicz Karol (1762 – 1842 en Parizo), pola generalo, partoprenis nacian leviĝon en 1794, komandis la unuan polan legionon en Italujo, kie li plenumis multe da brilaj faroj (vidu la rimarkon 42); en 1812 li aliĝis al la Napoleona armeo kaj estis komence lokita en la generala stabo de la vestfala reĝo; poste li ricevis komandecon super la 18-a divizio de la korpuso de princo Poniatowski; li distingiĝis en la bataloj ĉe Smolensko, Moskvo kaj apud Berezino. – Małachowski Kazimierz (1765–1845 en Francujo), aliĝinte al armeo en 1786 kiel simpla soldato, atingis la rangon de generalo, batalis en polaj legioj, distingiĝis en la milito de 1812, batalis en la pola insurekcio (1830). –

Grabowski Michał, generalo, pereis en la batalo ĉe Smolensko (1812). – Princo Romuald Giedrojc, generalo el la tempo de la Varsovia Duklando.

308) Libro nun tre malofta, eldonita en 1682 en Krakovo sub la titolo Compendium ferculorum, aŭ kolekto de manĝaĵoj de (nobele) naskita Stanisław Czerniecki, Sekretario de Lia Reĝa Moŝto kaj kuirejestro de Lia Moŝto Princo Lubomirski. Ĝi estis poste kelkfoje represita kun ŝanĝita titolo.

309) Jerzy (Georgo) Ossoliński, grafo de Tęczyn, eminenta ŝtatviro; sendite de reĝo Vladislavo la IV-a kun delegitaro al la papo Urbano la VIII-a, li faris brilan enveturon en Romon (1633), aperante ĉie kun eksterordinaraj pompo kaj lukso. Czerniecki, aŭtoro de Kuiristo perfekta, estis ankaŭ lia kuirejestro.

310) Princo Karol Radziwiłł, nomata „Sinjoro Amato” (Panie Kochanku),

laŭ la proverbo, kiun li ĉiam uzadis, la plej riĉa magnato de sia tempo en tuta Polujo, akceptis (1785) en sia kastelo en Nieśwież la reĝon Stanislavon Poniatowski, kaj ĉi tiu akcepto kostis al li milionojn.

311) Festo de Anunciacio.

312) En Litvo, post la enmarŝo de francoj kaj polaj armeoj, oni formis en la vojevodlandoj konfederaciojn kaj elektis senditojn por la sejmo.

313) Gros-de Tours, peza silkŝtofo franca.

314) Lacertledo, ledo malglata (ĉevala aŭ azena), aspekte simila al lacerthaŭto.

315) En la batalo ĉe Hohenlinden (la 3-an de decembro 1800) francoj sub komando de Moreau venkis aŭstrojn kaj bavarojn; la venkon decidis la pola korpuso sub komando de generalo Kniaziewicz.

316) Sommo-Sierra, intermontoj en Hispanujo; en ĉeesto de Napoleon ili estis okupitaj de polaj ulanoj, kiujn komandis Leon Hipolit Koziatulski (1808); tiu heroaĵo ebligis al francoj la vojon al la ĉefurbo Madrido.

317) Honora legio, franca ordeno por merito, fondita de imperiestro Napoleon la I-a en 1802.

318) Vortoj latinaj, kiuj signifas: „De notaĵo pri prava makulo”, t.e., ke li estos enskribita en aktojn de juĝejo kiel homo, kiu plenumis krimon.

319) Militem (latine) – soldaton, ĉi tie en la senco de nobelo; scartabello (itale) – malnova paperaĉo; la latinigita formo scartabellus signifas posedanton de la dokumento pri nobeligo.

320) Aĵo pie dediĉita.

321) Intercizo – ofica antaŭedziĝa kontrakto.

322) La unua kuniĝo aŭ unio de Litvo kun Polujo okazis en 1386 sekve de la edziĝo inter Jadviga, pola reĝino, kaj Vladislavo Jagiełło, litva grand-duko.

323) Laŭ fabela historio – poloj kaj rusoj devenas de la du fratoj: Leĥ kaj Rus. Pri Leĥ vidu la rimarkon 34.

324) La ordeno de Krucistoj aŭ Kruckavaliroj, venigita en la 13-a jarcento de la pola duko Konrado Mazovia, por ke ili defendu la limojn de Polujo kontraŭ atakoj de la idolanaj Prusoj, post la venko kaj ekstermo de tiu litova gento ili volis ankaŭ aneksi Litvon sub la preteksto de konvertado al kristaneco. La potencon de la Ordeno rompis fine Jagiełło en la militbatalo ĉe Grunwald kaj Tannenberg en 1410.

325) El la latina: pendebat – pendis, ne estis decidita.

326) Pola proverbo signifanta, ke ambaŭ estas egalvaloraj. – Generalo Pac konstruigis fine de la 18-a jarcento en sia bieno Jezno proksime al la urbo Troki grandiozan palacon, kiu fariĝis proverba. – Dum la tramarŝo de la Napoleona armeo en la Pac'a palaco ekloĝis tuta regimento. – Alia palaco de Pac troviĝas en Varsovio ĉe la strato Miodowa.

327) Ĉe Podhajce (en Galicio) okazis kelkaj bataloj kontraŭ turkoj kaj tataroj; ne estas konate, pri kiu batalo la Rejento parolas.

Libro dekkdua – Ni amu nin

328) Princo Mikołaj Krzysztof Radziwiłł, nomata „Sierotka” (Orfeto), Vilna starosto, kortega marŝalo litva, edukite en kalvina religio, li transiris al katolika eklezio, veturis en la Sanktan Landon kaj priskribis ĝin en aparta verko; li mortis en 1616.

329) Doni afirmativon,
doni voĉon por iu; doni
negativon, voĉdoni kontraŭ iu.

330) Veto, la latina vorto
signifas: „Mi ne permesas”.
Ĉiu pola sendito havis la
rajton, se li ne aprobis la
rezolucion de la seĵmo, diri:
„Veto” kaj tiamaniere
interrompi la parlamentan
kunvenon. Ĉi tiun rajton – la
simbolon de persona plej alta
libereco, dum tre longa tempo
kuraĝis uzi neniu sendito.
Fine, kiam la moroj
malboniĝis, la rajto estis ofte
misuzata de anarĥiaj
elementoj; do ĝin forigis la
Konstitucio de la Tria de Majo
(1791). Komparu ankaŭ la
rimarkon 11.

331) Gardistoj de
publika sendanĝereco.

332) Viandsupo,
buljono.

333) Kontuzo, speco de
kolbaso, mortadelo; arkaso,
gelato el kremo kaj ovoflavo;
fegatelo (itale), hepatherbo,
hepataĵo; Dunajec, rivero,

dekstra alfluo al Vistulo en
Galicio; veneca – Venecia.

334) En la 16-a kaj
komence de la 18-a jarcentoj,
en la epoko de florantaj artoj,
estis aranĝataj, eĉ de artistoj,
festenoj plenaj de simboloj kaj
teatraj scenoj. Dum fama
festeno, donita en Romo por la
papo Leon la X-a (1513-
1521), troviĝis servico,
prezentanta laŭvice la kvar
jaro-sezonojn, kiu verŝajne
servis kiel modelo por la
Radzivila. La tablokutimoj
aliiĝis en Europo ĉirkaŭ la
mezo de la 18-a jarcento; en
Polujo ili daŭris plej longe
(M.).

335) Pinetti, italo,
ĵonglisto fama en tuta Polujo;
kiam li tie gastis, ne estas
konate.

336) Tromblono, pafilo
kun larĝa elflug-tubo;
flankiroj, rajdista taĉmento,
disigita laŭ reguloj kaj
destinita por atentado kaj
maltrankviligo de la
malamikoj, ankaŭ por ŝirmado
de la ĉefa taĉmento antaŭ la
malamikaj pafadoj.

337) Dembiński Henryk (1781-1864), generalo de la pola armeo, batalis en Napoleonaj militoj, en du naciaj leviĝoj – pola (1830-1831) kaj hungara (1849).

338) Dwernicki Józef (1779-1857), servis en polaj legioj kaj batalis en la rusa milito (1812), fariĝis generalo de la pola armeo (1829) kaj batalis en naciaj vicoj (1830-1831).

339) Różycki Samuel, ĉefo de la tria bataliono.

340) Kniaziewicz naskiĝis en Kurlando, kien lia avo transmigris el Litvo. Vidu la rimarkojn 42 kaj 307.

341) Puławski (aŭ Pułaski) Józef, forminto de la Bara konfederacio (vidu la rimarkon 191) en 1768 kaj ĉefkomandanto de la armeo, havis du filojn: Franciszek, kiu pereis dum konfederacia batalo (1769), kaj Kazimierz, gloran heroon kaj bonegan komandanton, kiu pereis

(1779) en la amerika milito pri sendependeco.

342) Dzierżanowski Michał, fama konfederato Bara.

343) Sawa, unu el la plej bravaj armeestroj en la Bara konfederacio.

344) En Litvo estas konata plenda kanto pri sinjorino Cybulska, kiun la edzo kartlude malgajnis al moskvulo.

345) Dumouriez Klaŭdio Francisko, franca generalo; li batalis en la Bara konfederacio, kiun la franca registaro subtenis per monrimedoj kaj spertaj oficiroj.

346) La modo de alia vestiĝado en francajn vestaĵojn disvastiĝis tra polaj provincoj de 1800 ĝis 1812. La plej multaj junuloj alivestis sin antaŭ edziĝo laŭ postulo de siaj fianĉinoj.

347) Speco de muslino.

348) La historio pri la disputo de Rejtan kun la duko de Nasso, kiun Vojski ne rakontis ĝis la fino, estas konata el la tradicio. Ni donas ĉi tiun finon, por kontentigi la sciemon de legantoj: Rejtan, kolerigite pro fanfaronado de la duko de Nasso, stariĝis apud li en mallarga trairejo. Ĝuste tiam grandega virapro, furiozigite de pafado kaj hundaro, ĉi tien alkuris. Rejtan elŝiras pafilon el la manoj de la duko, sian pafilon li ĵetas teren, kaj kaptinte ĵetponardegon kaj transdonante duan ekzempleron al la germana duko: „Nun, li diris, ni vidos, kiu pli bone svingas lancon”. La apro jam atakis, kiam Vojski Hreczecha, staranta defore, per celtrafa pafado la beston mortigis. La sinjoroj komence koleris; poste ili interpaciĝis kaj rekompencis malavare Hreczechan. (Rimarko de la poeto).

349) La rusa registaro ne rekonis liberajn homojn krom nobeloj. Kampuloj, liberigitaj de posedanto, estis tuj

enskribitaj en registrojn de caraj apanaĝaj bienoj kaj anstataŭ servutaĵo devis pagi pligrandigitan imposton. Estas konate, ke en 1818 la bienularo de la Vilna gubernio decidis dum seĝmeto projekton liberigi ĉiujn servutulojn kaj tiucele elektis delegitaron al la caro; sed la registaro ordonis nuligi la projekton kaj neniam plu ĝin rememorigi. Ne ekzistis alia maniero liberigi homon, ol adopti lin al nobela familio. Tiamaniere nobeliĝis multaj dank’ al sinjora favoro aŭ por pagita mono. (A. M.)

350) El la tataro:
„kanako” – virina kolornamo,
inkrustita per juveloj;
„manelo” – braceleto.

351) Bellona – ĉe antikvaj Romanoj diino de milito.

352) Boreas – ĉe antikvaj Grekoj norda vento kaj ĝia personigo.

353) Janiĉara aŭ turka muziko distingiĝas per multaj

tintantaj kaj tamburantaj instrumentoj.

354) La Tria de Majo (1791), dato de la fama konstitucio bonege reforminta la regionon de Polujo. (vidu la rimarkon 54)

355) Pola parlamento.

356) Pri la ribela Targovica konfederacio legu la rimarkon 54.

357) Praga, antaŭurbo de Varsovio. En 1794 la rusa generalo Suvorov forbruligis ĝin.

358) Post la tria dispartigo de Polujo (1795) polaj soldatoj elmigris el la patrujo kaj generalo Dombrovski formis el ili la polajn legiojn, kiuj batalis heroe en diversaj landoj kaj terpartoj por Napoleono. Komparu la rimarkon 9.

359) Kanto de la legiojn en Italujo; ĝi fariĝis poste kaj estas ĝis nun la pola

nacia himno. Komparu la rimarkon 9.

360) Kometo en 1811. Komparu en la Libro Oka la version 109 kaj pluajn.

361) Legu la rimarkon 13.

362) Karabelo, kurba sabro; komparu la rimarkon 56.

363) Konfederatka, vidu la rimarkon 163.

364) La leganto, kiu rimarkis la intiman interligon, en kia la poeto prezentadas naturaperaĵojn flanke de homaj aferoj, facile komprenos, ke la nubajo, tiel vaste pripentrita ĉe la fino de la poemo dum la granda festeno, ne estas nur okaza eksterajo, sed, ke ĝi havas por la tuta situacio simblan signifon. La okcidenta nubajo, ekstere ornamita per oro kaj perloj, interne sange-ruĝa, malgraŭvole pensigas pri la granda okcidenta heroo Napoleono kaj pri la esperoj,

kiujn Polujo ligis al lia nomo.
Estas la jaro 1812: La aŭreolo
de lia nomo kaj la ĝojaj
esperoj de la festenantoj same
baldaŭ iĝos „flavaj, palaj,
grizaj laste”, kiel la brilanta,
preterpasema aĉeraĵo, post kiu
la suno ekdormis. – Kiel
antaŭe en la vortoj de la
maljuna Maciek Dobrzyński
(el la Libro Dekdua vidu la
versojn 370-400) la poeto
kvazaŭ antaŭsentigas la
grandan tragedion, kiu estis
baldaŭ skuonta Litvon-
Polujon kaj la tutan mondon.

.

>

.....

'

;)×

.....

o o o o o o o o o o o o o o o o

„& -a parto:

'

.....

'49

€€

ĈĜĤĴŜŬ ĉĝĥĵŝŭ Üßü ÇĔİĖçëïœ Ññ ÂÊÎÔÛ âêîôû
ABCDĎEFGHĴ KLMNOPQRSTP UVWXYZÆØÅÄÖ
abcdďefghĵ klmnopqrstp uvwxyzæøåäö